Tiu prelego multimedia akompaniĝas de lia filo Roland Hanslmeier MA, elstara trombonisto kun pluraj kompaktdiskoj publikigitaj. Tria membro estas Hans-Georg Baumgartner je la E-gitaro, kiu efektplene zorgas pri tre atmosfera sonkuliso. Tiu muzikakompano plikomprenigas la montritajn efektojn de la procedoj en la universo, la praeksplosion, la ekspansion kaj eĉ nigrajn truojn, kaj zorgas pri senstreĉiĝaj paŭzoj inter la rakontoj.

Entute bonega mikso, kiu tiuforme ankoraŭ ne ekzistis. Vi travivos misteran vojaĝon tra nia kosmo, per la ligo de muziko kaj astrofiziko aperas novaj aliroj, nekonataj dimensioj kaj modifita rigardo al nia senlima universo!

Kaj nova estos la fakto ke la lingvo de la prezentado estos la lingvo de la grandega kongreso, la 111-a Universala Kongreso de Esperanto de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto 2026 en Graz, Stirio, Aŭstrio!

Hans Michael Maitzen,
fakkolega amiko de prof. Hanslmeier, 2025-11-12



DeepL- und Bing-Übersetzer mit Esperanto

25 Jahre Fortschritte für Esperanto.

Seit Anfang November bietet der Übersetzer von DeepL auch Esperanto an, zunächst noch in einer Beta-Version. Bis dahin konnte man sich von DeepL für etwas mehr als 30 Sprachen helfen lassen, jetzt wurden gleichzeitig rund siebzig weitere Sprachen hinzugefügt. DeepL hat im Übrigen die Fachwelt und das allgemeine Publikum schon seit seinem ersten Erscheinen 2017 mit hoher Übersetzungsqualität nachhaltig beeindruckt.

Auch Microsoft/Bing nun mit Esperanto

Auch Microsoft hat seinem Übersetzer bei Bing Esperanto angefügt, im Oktober 2024 (bing.com/translator); Microsoft kam damals von etwa 136 Sprachen und Sprachvarianten auf 177. (Bei Übersetzern scheint Esperanto erst bei einer hohen Anzahl von schon angebotenen Sprachen eingeführt zu werden. Bei Sprachkursen ist unsere Sprache oft schon unter den ersten 20 bis 30 angebotenen Sprachen.)

Ein Vierteljahrhundert Fortschritte für Esperanto

Diese Fortschritte für Esperanto sind Teil einer größeren Entwicklung im letzten Vierteljahrhundert: Viele verschiedene Sprachdienste im Internet haben Esperanto in ihr Angebot mit einbezogen. Unsere Sprache wird, wie erwähnt, von einigen maschinellen Übersetzern berücksichtigt, zunächst seit 2012 von Google. Sprachlernseiten haben Esperanto im Angebot — am bekanntesten ist sicher Duolingo; auf Deutsch u. a. Lingolia. Anscheinend stellte sich für viele große Ersteller von Chatbots der künstlichen Intelligenz in letzter Zeit kaum noch die Frage, ob Esperanto mit dazu gehört; jedenfalls kann man ein Dutzend dieser Chatbots in Esperanto befragen (und auch Übersetzungen anfordern). Ebenso bieten viele Wörterbücher im Netz Esperanto an, einschließlich Tatoeba, einer Satzsammlung, bei der Esperanto nach der Anzahl der Sätze an vierter Stelle liegt. In der Wikipedia ist Esperanto seit 2001 vertreten und hat heute mit etwa 375.000 Artikeln Platz 37 im Vergleich zu allen anderen Wikipedia-Versionen.

Den Vertrieb von Esperanto-Büchern erledigen, wenn der Verlag dies wünscht, die verschiedenen Buchversand-Unternehmen im Internet. Ein Buch in Esperanto veröffentlichen kann man heute für sehr wenig Geld im Selbstverlag; ein Books-on-Demand-Verlag kann dabei helfen.

Neue Techniken helfen Esperanto

Die Einbeziehung von Esperanto ist in starkem Maße Folge des Internet sowie weiterer technischer Neuerungen, die die Preise erheblich verringert haben. Während zum Beispiel früher eine Sprachschule nur selten mehr als 10 oder 20 Sprachen anbot, kann heute ein Sprachenanbieter im Internet mit sehr geringen Zusatzkosten zahlreiche weitere Sprachen in sein Programm aufnehmen. Dieser Effekt wird als „long tail“ bezeichnet — die Reihe der Angebote ist lang und auch Nischenprodukte können berücksichtigt werden.

Staaten nutzen und fördern Esperanto

Es gibt auch ein paar staatliche Stellen, die Esperanto nutzen oder anbieten: China veröffentlicht seit 2001 täglich Nachrichten in Esperanto. Die spanische Fernuniversität hat seit 2018 einen Esperanto-Sprachkurs im Programm, zunächst für das Niveau A2, mittlerweile auch bis B1 und B2. Die EU-Kommission hat in den letzten Jahren ihre bisherige Zurückhaltung gegenüber Esperanto fast völlig aufgegeben; es wurden schon viele Esperanto-Projekte gefördert, oft Austauschmaßnahmen im Rahmen von Erasmus+. Vielleicht hat dabei geholfen, dass Polen Esperanto 2014 auf die Liste seines Kulturerbes gesetzt hat und Kroatien die Esperanto-Tradition 2019 als Kulturgut anerkannt hat.

Früher waren wir froh, dass es ein paar nationale Radiosender gab, die Esperanto-Sendungen ausstrahlten, oder wenn ein Buchverlag nach langen Verhandlungen ein Esperanto-Wörterbuch ins Programm aufnahm. Damit endete damals allerdings im Wesentlichen die externe Unterstützung. Alle anderen Dienstleistungen mussten Esperanto-Organisationen erstellen.

Nutzung und Perspektiven von Esperanto

Grundlage für all das sind weniger unsere hoffentlich unschlagbaren Argumente für Esperanto. Eher waren es, wie oben erwähnt, neue Techniken sowie die reinen Fakten zu Esperanto, nämlich die alltägliche Nutzung der Sprache im Internet. Im Jahr 2000 veröffentlichten die Autoren Gregory Grafenstette und Julien Nioche eine Studie über die Verwendung von Sprachen auf Internetseiten. Esperanto landete auf Platz 27 der Sprachen mit lateinischer Schrift und lag damit in etwa gleichauf mit Baskisch, Lettisch und Litauisch. Vermutlich ist Esperanto seither etwas zurückgefallen; ziemlich sicher sind es aber auch heute noch wie vor insbesondere die schon vorhandenen Texte in Esperanto, die Anbieter überzeugen, unsere Sprache zu berücksichtigen.

Für weiteren Fortschritt kann man auf günstige Umstände hoffen oder auf Einsicht von Politikerinnen und Politikern. Eine weitere Möglichkeit ist es, Esperanto-Sprachkurse zu organisieren, bezahlte Werbung dafür zu machen und diese durch Kursgebühren zu finanzieren.

Lu Wunsch-Rolshoven

Du-hora Esperanto-prelego ĉe internacia MENSA-konferenco en Düsseldorf

Mensa estas mondvasta asocio por altinteligentuloj kiuj atingis poentaron en la supra 2% de psikologia testo de intelekta kvociento.

Ĉi-jare la ĉefa aranĝo de Mensa International, la IBD (International Board of Directors), plivastiĝis al IBD+ renkontiĝo, kun abundo da flankaj programoj por ĉiuj membroj. Tial ne nur la delegitoj, sed ĉiu Mensa-ano povis trovi ion allogan.

Kiam mi rimarkis en la programo, ke danke al Rainer Kurz estos ankaŭ prelego pri Esperanto, mi unue ekmiris — kaj tuj ĝojis. Interalie pro tio mi decidis mem partopreni la renkontiĝon en Duseldorfo inter la 23-a kaj la 26-a de Oktobro 2025.

La 24-an de Oktobro, en la flughavena hotelo Maritim, d-ro Rainer Kurz prezentis dum du horoj en la angla lingvo sian enkondukon “Introduction to Esperanto – The world’s easiest language”.

Li unue koncize skizis la historion de la lingvo, de Zamenhof ĝis la hodiaŭa tre vigla komunumo. La ideo de neŭtrala lingvo sen avantaĝo por denaskuloj harmonie resonis kun la meritokratia spirito de Mensa. Li ankaŭ prezentis Espermenso-n, la internacian grupon de Esperantlingvaj Mensa-anoj.

Rainer klarigis la kernajn trajtojn de Esperanto: Nur 16 bazaj gramatikaj reguloj, travidebla vortfarado, fonetika ortografio kaj regula konjugacio. Tio, laŭ li, ebligas atingi konversacian nivelon multe pli rapide ol ĉe plej multaj naciaj lingvoj.

Por viviĝi la temon, li montris kelkajn tre mallongajn filmojn en Esperanto kun anglaj subtekstoj. Unu el ili klare prezentis, kiel funkcias Pasporta Servo kiel tutmonda gastiga reto inter esperantistoj. Tio tuj vekis inter la ĉeestantoj praktikan intereson pri vojaĝado, interkultura sperto

kaj malkostaj kontaktoj. Li ankaŭ malfermis la retpaĝon de Eventa Servo por montri, ke ĉiutage tutmonde okazas pluraj Esperanto-eventoj, rete kaj surloke. Tiu konkreta fluo de okazintaĵoj konvinke montris, ke Esperanto ne estas muzeobjekto, sed vivanta reto. La publiko reagis per scivolemaj demandoj pri la lernvojoj, retaj kursoj kaj lokaj kluboj.

Mi mem eliris el la salono kun la sento, ke la temo perfekte taŭgas al la “plus”-programo de IBD+, kie oni malkovras novajn ideojn kaj ludas per konceptoj. La IBD+ programo mem — kun ekskursoj, ludoj, prezentoj kaj laborejoj — kreis fekundan fonon por tia lingva eksperimento. En tia medio Esperanto aperas kiel logika ilo por justa, rekta kaj egaleca komunikado inter homoj el multaj landoj.

Resume, danke al la prelego de Rainer Kurz, Esperanto ricevis modernan, praktikan kaj tre allogan lumon ĉe IBD+ 2025.

Imre Keményfi,
Szentendre/Hungario



Moderna lernado en malnovaj muroj

Preskaŭ kiel princinoj kaj princoj ni sentis nin dum nia semajnfino en la kastelo Oberwerries en Hamm.

Nia malgranda grupo de 13 lernantoj loĝis tie kun tri spertaj instruistoj de la 24-a ĝis la 26-a de Oktobro 2025.

La Esperanto babilado dum niaj kursoj donis modernan aspekton al la malnova kastelo, analoga al la multaj sportistoj de la WTB (*Westfälischer Turnerbund*) kiuj loĝis samtempe en la kastelo. La WTB administas la kastelon kaj ĝiaj kuiristoj kuiris por ni (preskaŭ) kiel por geprincoj?

Krom lerni Esperanton – en tri grupoj de tri niveloj – kaj manĝi, ni pasigis vesperojn ludante en la kastela trinkejo. Do, semajnfino tute sukcesa.

Ĉar la kurso nun jam estas tradicio, ni planas daŭrigi ĝin en 2026.

La datoj ankoraŭ ne estas konataj. Ni informos vin pri ĝi ĉi tie.

Petra Hilgemann/Hamm



Norbert Gütter

Fachwortliste
Olympische Winterspiele

Terminaro
Vintraj Olimpiaj Ludoj

Deutsch – Esperanto

Esperanto – Deutsch

2025

Terminaro de Vintraj Olimpiaj Ludoj

Okaze de la Vintraj Olimpiaj Ludoj en Milano kaj Cortina d'Ampezzo (6. – 22.2.2026) mi komplete

tralaboris kaj pliampleksigis la fakvortliston, kiun mi publikigis antaŭ tri jaroj.

Ekzistas du variantoj (germane – Esperante kaj Esperante – germane), kun ĉiufoje ĉirkaŭ 2.600 vortoj/tradukoj.

Por ĉiu termino oni trovas la fontindikon. La bazo (ĉ. 45 % de la vorttrezoro) estas la vortaroj de Erich-Dieter Krause.

La terminaro estas je via dispono sub la sekvanta interretadreso:

https://www.esperanto.de/sites/default/files/esperanto.de/DEB_OG_Muenchen/vinol.pdf

Norbert Gütter,
Esperanto-Klub München

Danko kaj saluto de EBLOGO

Karaj legantoj,

**Hodiaŭ estas pluva kaj malhela
Novembro-tago. Malvarmaj frostaj
vintrotagoj venos baldaŭ.**

Mi dankas al ĉiuj por viaj subteno kaj helpo al blinduloj en la agrabla inklusiva etoso de Esperantujo.

Nun mi memorigas kaj informas dankema iomete pri la agado de EBLOGO en 2025.

Okazas nun ĉiutage 24 horojn pere de „Blindzeln Kultur“ Radio Esperanto de EBLOGO kun bonkvalita programo. Kiel aŭskulti ĝin vi povas legi sur paĝo 7 de Esperanto aktuell n-ro 293.

Kun ĝojo ni anoncas ke ni verkis kelkajn Esperanto-kantojn en la formato MP3. La unuaj du kantoj nomiĝas „Esperanto por ĉiuj“ kaj „Gratulojn al Natalia“. Ni ankaŭ verkis kelkajn poemojn esperante kaj germane kaj prezentis ilin la 15-an de Septembro 2025 en la komencantogrupo en la virtuala Esperantosalongo sur la „Maulwurfshügel“ pere de Teamtalk.

Mi tre ĝojas, ke kelkaj blindaj membroj de EBLOGO partoprenis regule en diversaj fizikaj eventoj en 2025. La agrabla konata kaj ŝatata etoso en Esperantujo estis sentebla en la sekvaj Esperanto-eventoj:

Luminesk' komence de la jaro en Bielefeld.

La kunveno de GEA-estraro, la landaj ligoj kaj fakasocioj kaj ankaŭ la EMAS-sembleo dum pentekosto ekde la 29-a de Majo ĝis la 1-a de Junio 2025 en Herzberg, la Esperanto-urbo;

89-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) kun maratona kurso ekde la 30-a de Junio ĝis la 10-a de Julio 2025 en la Esperanta kastelo Greziljono en Francujo.

Esperanta Germana-Beneluksa kongreso ekde la 2-a ĝis la 5-a de Oktobro 2025 en Schleiden-Gmünd en la montaro Eifel.

102-a jarkongreso de Saarlanda Esperanta Ligo (SEL) en Oktobro de ĉi tiu jaro en Homburg/Saar.

Kaj fine de ĉi tiu jaro okazos Luminesk' en Bingen kun kelkaj blindaj partoprenantoj.

Multaj virtualaj eventoj okazis ankaŭ regule. Ĉiumonate la 15-an okazis vespere internaciaj retkonferencoj kun kvalita impulsprelego por Esperantaj amikoj el multaj landoj en la virtuala Esperantosalongo de EBLOGO pere de Teamtalk.

Ĉiumonate okazis bazaj informoj por novuloj kaj meznivela konversacia rondo de planlingvo Esperanto kun multe da ĝojo

en malgrandaj blokoj en nia virtuala Esperantujo. Daŭras ankaŭ la Esperanta lingvokurso por progresantoj. En la ĉefpaĝo de *Esperanto.de* estas maldekstre en la menuo sub "Virtuelle Veranstaltungen" ligilo por rekte eniri en la virtualan Esperantosalongon de EBLOGO.

Nun troveblas pli ol 70 diversaj dosieroj en la Esperanto-salono por elŭti.

Estas ankaŭ Esperanto-kantoj en MP3 formato, bakreceptoj, intervjuoj ktp.

EBLOGO flegas dinamikan kahelon kun aktualaj informoj en la apo „Blindzeln“. La nuna celo estas fari daŭre bonkvalitajn retradioelsendaĵojn kaj podkastojn.

Kunlaborantoj kaj subtenantoj estas bezonataj kaj tre bonvenaj! Do, mi dankas ĉiujn helpantojn kaj kunlaborantojn por ebligi bonan inkluzivan partoprenon de blindaj esperantistoj kaj por fari tre bonan etoson.

Estis en la jaro 2025 tre bona agrabla helpo. Do, mi nun ankaŭ petas ĉiujn, bv. kunlabori kaj subteni EBLOGOn ankaŭ en la jaro 2026 en diversaj formoj por plibonigi Esperantujon por blinduloj.

Komence de ĉi tiuj salutvortoj mi skribis pri la malhelaj kaj la venontaj frostaj tagoj, sed nun mi rimarkas la esperon por ni.

Eĉ la plej malgranda lumo brilas en la mallumo de malvarmego. Fine mi deziras al vi ĝojajn festotagojn fine de la jaro 2025 kaj feliĉan novan jaron 2026.

Nova Jaro

*Nova jaro, nova folio,
la estonteco vokas, la tempo vekiga.
La horloĝo batas dek du, la momento haltas,
antaŭ ni la nekonata, vasta kaj bela.
Kun espero kaj sonĝoj plenaj,
ni paŝas enen, kun celo en la okulo.
Ne estas jaro simila al alia,
sed ĉiu portas ŝancon por feliĉo.
Ke paco nin gvidu,
ke kuraĝo ĉiam montru la vojon.
Kaj per ĉiu paŝo ni ekkomprenu,
ke ĉiu fino ankaŭ estas komenco.*



Werner Groen

(Prezidanto de EBLOGO)

<https://www.esperanto.de/de/eblogo>

Rp: EBLOGO@Esperanto.de

<https://webradio.blindzeln.org/>

[listen/radio1/radio.mp3](#)

Telefono: 0151 54 82 69 07

4 tagoj, 10 lagoj kaj 16 migrantoj

La Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA) de Germana Esperanto-Asocio havas longan tradicion: la 13-a EMA okazis ĉi-jare inter la 19-a kaj la 24-a de Oktobro.

Jam de 2020 la migradon por GEA organizas Gerald Roemer kaj Mariko Aoshima. La tria Oktobra semajnfino ŝajnas esti taŭga tempo por tiaj aktivecoj. En 2020 kaj 2021 ĝuste tiam la nombro de KOVIM-infektiĝoj estis sufiĉe malalta, por permesi renkontiĝojn (ĉiujn aliajn GEA en tiuj jaroj devis nuligi). Kaj ĉiun fojon en la pasintaj jaroj la vetero favoris nin.

Ĉi-foje la migrantoj esploris tre vizitindan parton de norda Germanio. Bazo estis eklezia kleriga domo apud la urbo Plön. Niajn celojn ni atingis aŭ piede de tie aŭ post mallonga aŭtobus- kaj trajn-veturado al Eutin kaj Malente-Gremsmühlen. Großer Plöner See, Eutiner See kaj Dieksee estas nur tri el la lagoj kaj lagoetoj, kiujn ni pasis aŭ eĉ komplete ĉirkaŭis. La piediraj distancoj estis inter 12 kaj 15 kilometroj tage – do fareblaj ankaŭ por pensiuloj – kaj nur unu tagon akompanis nin iom da pluvo. Tagmeze ni paŭzis en la naturo kun kunportitaj lunĉpaketoj aŭ vizitis lokajn gastejojn: tre bela estis la « Fährhaus Niederkleeze » apud Dieksee. Kaj vespere ni havis programon: la temoj estis Longdaŭrismo, Baltiaj Esperanto-Tagoj, Trajnvojaĝo tra Japanio kaj Vizito al kvar landoj de Centra Azio.

La kvanto de kunmigrantoj en la pasintaj jaroj ne multe ŝanĝiĝis: kun 16 personoj eblas migri sen tro grandaj prokrastoj aŭ organizaj malfacilaĵoj. Ni eĉ kutime alvenis pli frue ol antaŭvidite en la programo. Kaj jes: kvankam ĉi-jare ĉiuj partoprenantoj venis el Germanio, neniu krokodil-signo de disciplino aŭ simple kutimo en tiu amika rondo. La geografo sen grandaj montoj aŭ deklivoj estis favora por



Gerald klarigas la programon por la semajno.

mia aĝ-grupo. Venontan fojon la defio estos iom pli granda: post la lagoj de « Holsteinische Schweiz » sekvos la montoj de « Sächsische Schweiz » laŭlonge de la rivero Elbe sude de Dresden (strange, kiom da Svislandoj ekzistas en Germanio). Mi esperas, ke ĉiuj denove povos partopreni kaj daŭrigi la tradicion. Grandan dankon al la organizantoj Gerald kaj Mariko!

Ulrich Brandenburg



Großer Plöner See kun la migrantinoj.



Tagmeza paŭzo en Fährhaus Niederkleeze.



La kastelo de Plön, fotita de Prinzeninsel.

Pegoj dumtage – gufoj en la nokto

Estis la kalendarata translokiĝo de la Germana Esperanto-Kongreso de Pentekosto en la aŭtunon, kiu devigis GEFA decidi pri sia kutima samsezona jarkunveno.

Rezultis rezigno pri propra aranĝo kaj partopreno en tiu, kiun Germana Esperanto-Asocio nun organizis komune kun la nederlanda, la belgaj kaj la luksemburgia organizaĵoj.

La loko en Schleiden-Gemünd, novkonstruita junulargastejo rande de la nacia parko kaj natura rezervejo Eifel, montriĝis trafike iom defia, sed strukture tre taŭga por esperantistaj gastoj atendantaj varian programon kaj same ankaŭ eblojn por ĝui arbaron kaj freŝan aeron. Preskaŭ 150 esperantistoj sekvis la inviton.

La domo ofertis abundan spacon por plej variaj kontribuoj. La ekspozicio „Rezisti al militpropagando“ tuttempe povis okupi la vestiblon antaŭ la granda salono. Ĝi per kolekto de historiaj tekstoj kaj bildoj dokumentis la strategion, per kiu homoj estas preparataj por milito. Montri ĝin nuntempe, vidante en danĝero la pacon en Mezeŭropo, estis malkvietiga impulso.

Tial aŭdi pri la kurioza epizodo „Neŭtrala Moresnet“, la hazarda kreaĵo de la Viena Kongreso, signifis taŭgan kompenson. Ĉu pro aliaj prioritatoj, ĉu pro la prefero danci – la granda diplomatia konferenco novordigante la postnapoleonan Eŭropon postlasis tiun 350 hektaran triangulon inter Belgio kaj Prusio/Germanio kaj pinto apud Nederlando sendecide al najbare implikitaj posteuloj. Tia



ĝi restis dum pli ol cent jaroj, neŭtrala, ne vera ŝtato, kun tralasivaj limoj, interesaj solvoj celantaj bremsi hazardludojn, prostitucion kaj alkoholkonsumon, sen propra polico, kun urbestro sen klaraj taskoj, kun ekonomio surbaze de zinkominejo kaj kontrabando. Kun la kreaĵo Neŭtrala Moresnet en la jaro 1919 malaperis ankaŭ la ideo tie fondi Esperanto-ŝtaton.

Minoritato inter la kongresanoj proprainiciate vizitis la iaman nazian edukejon „Burg Vogelsang“. La neniam finita konstruensemblo super la Urft-valo celis kun aliaj tiaj centroj servi kiel akuŝejo por novaj generacioj de la ideala ĝermana raso. Kolekto de ekspoziciitaj dokumentoj desegnas la vojon de la nazioj al la potenco kaj la koncepton de tiuj edukejoj, kiuj nomis sin „lernejoj“ kvankam ili ne peris scion, sed formis junulojn blinde obeemajn, korpe trejnatajn, konsciajn pri sia eliteco.

La tereno ĝis la jaro 2004 estis uzata kiel ekzercejo de la belga armeo kaj depost la redono dediĉita al memorigo.

Kvankam por la gvidata promeno al certaj lokoj de la naturprotektejo la veteraj kondiĉoj estis iom malkonvenaj, grupo de migremuloj ne lasis sin timigi kaj reveninte ruĝvizaĝa, trablovita raportis pri unikaj perspektivoj kaj raraj renkontoj kun pegoj kaj aliaj sovaĝaj bestoj.

En apartaj programblokoj la reprezentitaj asocioj kunvenis laŭ siaj respektivaj statutoj. GEFA ligis sian kunsidon al publika prelego pri la sekvoj de la vetera katastrofo trafinta la Eifel-regionon kaj la najbarojn en Julio 2021, pri la konkludoj kaj la streĉoj rekonstrui kaj refunkciigi la detruitajn fervojajn liniojn.

La vesperojn okupis jen pli jen malpli laŭta muziko – el konservajo en la „gufujo“ aŭ vive en la granda salono: JoMo laŭ propra informo debutis kiel emerito, kun kelkaj pliaj grizaj haroj – koncedite – sed cetera vigla kaj efika kiel ĉiam – artisto kiu konas sian publikon.

Alian vesperon ni interkonatiĝis kun nova duopo „Mezbakita“, kiuj prezentis kantojn proprajn kun poeziaj tekstoj kaj (kiel diri?) „sendependaj“ melodioj kaj kiuj en la publiko kolektis kapvortojn kaj desegnaĵojn kiel instigojn por novaj kantoj. Ni atendu la rezulton.

La GEFA-estraro prilumis la evoluon de la pasinta jaro, speciale la zorgovekan membrostatistikon. Funkcioj kaj funkciuloj restis senŝanĝaj. GEFA-jarkunveno 2026 denove okazu – la aŭtuno ree liberiĝis. Loko antaŭvideble estos hotelo Lindenbach en Bad Ems.

Guido Brandenburg

(Ĉi tiu artikolo ankaŭ aperas en la revuo *Fervoja Esperantisto* 4/2025.)

Mia somera vojaĝo en Germanio

Post naŭ monatoj da instruista laboro en Benino, mi feris dum la somero en Germanio.

La 27-an de Junio mi flugis per Air France kaj atingis Frankfurton la 28-an, kie mi estis akceptata de la paro Detlef & Susanne Haußner ĉe la flughaveno.

Mi estis du noktojn gasto en Darmstadt antaŭ ol kunveni kun la nelacigebla esperantisto-amiko Andreas Emmerich en Brombachtal. Mi restis kun Andreas dum pli ol unu monato, kie mi faris multajn diversajn profesiajn spertojn, interalie la ordigado de aĵoj kaj la burokrataj aferoj kaj partoprenis kursojn pri la germana lingvo en lia lernejo en Michelstadt. Mi ankaŭ partoprenis la francajn kursojn por la tieaj lernantoj. Tie mi konatiĝis kun ludkursoj per literkartoj. Estis interese kaj amuze. Mi ankaŭ partoprenis la lernojarfinan feston, kiun la lernejo-fondinto Andreas Emmerich organizis. Dum la festo multaj provis babili kun mi en la germana. Bedaŭrinde mia scipovo ne ebligis min komuniki, escepte de kelkaj frazoj kaj vortoj. Sed tiuj, kiuj instruadas la francan en la instituto facile kaj libere komunikadis kun mi kaj instigis min daŭrigi la lernadon de la lingvo. De 2004 mi ekvojaĝis al Germanio, sed neniam revis lerni la germanan. Mi estas fiera kun Esperanto. Pro diversaj flankaj motivoj mi eklernis la lingvon per Duolingo.

En Erbach estis grandega festo de la provinco. Kun Andreas mi partoprenis la feston.

Tie estis kelkaj ludil-aparatoj, kiujn mi neniam antaŭe estis vidinta. Andreas partoprenigis min al unu, kie oni devis sidi en la aparato, kiu movigis nin supren kaj malsupren. Mia koro forte batis, ĉar mi demandis al mi, kio okazus, se ne estas elektro. Timo estis en la koro, sed ĝojo okule.

En Herzberg estis ekskurso. Mi vizitis kun la familio de Andreas Emmerich kaj kun lia amiko Achim muzeon. En tiu muzeo estas esperantaĵoj, kiuj estas la agado de Esperanto-centro en Herzberg. Mi eternigis mian viziton en la gastolibro.

Mankas tempo al Andreas. Malgraŭ tio, li kelkfoje trovis liberan tempon, por montri al mi la urbon Michelstadt, kie troviĝas tre modesta katolika preĝejo,

konstruita en la jaro 1494. Alia loko, kiun ni vizitis, estis la turisma urbo Heidelberg. Tie estis mia unua kontakto kun funikularo (kablo-tramo), kiu transportis pli ol centon da personoj al la monto, por viziti la tiean kastelon. Alia vidindaĵo estis la muzeo, apartenanta al tiuj partoj de la kastelo, kiujn francoj estis detruintaj en la 17-a jarcento.

Post Brombachtal kaj Herzberg mi komencis la rondvojaĝon por prelegi. La 25-an de Julio mi iris al Betti Maul en Gröbenzell, kie ŝi gastigis min. Betti kaj mi konatiĝis dum la pasintjare okazinta printempa semajno internacia (PSI) en Bayreuth. Mi tie restis ĝis la 13-a de Aŭgusto. Mi devas danki Karl Breuninger, Uli Ender kaj ĝenerale la Munkenajn klubanojn, kiu finance apogis mian restadon ĉe Betti. Mi kuiris fufu kaj pikan saŭcon por Afrike manĝi. Mi konatiĝis kun la gepatroj de Betti. La patro Stefan Maul estis la redaktoro de *Monato*. Ni iom babilis en Augsburgujo. Estas Esperanta familio, en kiu Esperanto estis la denaska lingvo de Betti.

La 14-an de Aŭgusto mi enrajniĝis al Braunichswalde, vilaĝo apud Gera. Min gastigis la familio de juna paro David kaj Flama Henkel. Diversaj renkontiĝoj okazis en la regiono. La unua okazis en Zwickau. Ni babilis en Vietnamia restoracio. Estis tre bona etoso kun la tieaj esperantistoj. La dua estis hejme kun la amikoj de David kaj Flama. La gepatroj de David estas afablaj. La patro disponigis al mi biciklon por la promonado kaj kelkfoje veturigis min en najbaran urbon. En la regiono estis kastelo, kiun ni ĉiuj vizitis per biciklo. Tio rememorigis min kiam mi estis lernanto kaj biciklis el mia naskiĝvilaĝo al la urbo Lokossa. Pro laborkialo kaj manko de tempo mi moviĝis al alia paro de la sama klubo. Temis pri Olga Dreyer kaj Fred. Estis interese tie ankaŭ. Mi partoprenis la sendependecan feston de Ukrainio en Werdau, kie



En la Berlina oficejo de GEA.

mi deklaris min solidara kun la ukrainiaj rifuĝintoj en la regiono. La 25-an de Aŭgusto mi daŭrigis mian rondvojaĝon kaj estis akceptata de Andreas Diemel. Li prelegis en Düsseldorf pri "La vojaĝo al Afriko sen moviĝi". Hans estis je mia dispoŝo por ĉiĉeroni sekve laŭ la peto de Andreas. La 28-an mi iris al Bochum kie Petra Dueckershoff atendis min. Estis ununokta restado antaŭ atingi Hamburgon. Ne estis prelego sed renkontiĝo kun la tieaj esperantistoj. La tiea motoro estas Gerald Roemer, kiu gastigis min. Ni kune iris al jaz-konzerto por muzikumi. La 31-an de Aŭgusto estis alia itinero. Mi vojaĝis al Berlino. Estis mia unua kontakto kun la germana ĉefurbo. Mi estis gastigata de Ulrich kaj Barbara Brandenburg. Mi prelegis en la sidejo de Germana Esperanto-Asocio en Berlino pri la sama temo. Ulrich, Felix kaj Elisabeth Schwarzer montris al mi la urbon. Estis belaj vidindaĵoj. Mi studis historio de berlinan muron surloke. Por mi pli kaj pli alproksimiĝis la refugo. Mi revenis al Guido Brandenburg kaj prelegis en Münster. Tiu urbo estas turisma kaj tre riĉa en historio. Kun Guido mi vizitis la botanikan ĝardenon kie mi vidis kelkajn plantojn el Afriko. La plej ŝatataj vidindaĵoj estis la muzeoj kaj la preĝejoj. La 5an de Septembro mi revenis



En Munkeno kun Uli Ender kaj Emmeran Eder.

denove al Andreas Emmerich kaj poste al la paro Detlef & Susanne Haußner. En Darmstadt estis vespera renkontiĝo kun la tieaj esperantistoj por adiaŭi ilin.

La 12-an de Septembro mi reflugis el Frankfurt al Benino tra Parizo.



Ĉe la grupo en Münster.

Notindas danki al Tuomo Grundstrom, Karl Breuninger, Nicola Ruggiero kaj Ralf Haumer, kiuj subtenadis la okazigon de la vojaĝo. Apartan dankon al Uli Ender, kiu ĉion faris por sukcesigi la rondvojaĝon malgraŭ la zigzaga itinero. Plian dankon al Andreas Emmerich, Detlef & Susanne Haußner, Andreas Diemel, Gerald Roemer, Petra & Ralf, Ulrich kaj Barbara Brandenburg, Guido Brandenburg kaj Betti Maul pro la gastigado.

Raportis **François Hounsounou**
Lokossa/Benino



Kun Guido Brandenburg en Drensteinfurt.

Per Pasporta Servo en Germanio

Antaŭ 11 monatoj mi eklernis Esperanton pere de Duolingo. Sed ĝis nun mi neniam parolis Esperanton kun vera homo. Danke al Pasporta Servo tio nun ŝanĝiĝis!

Mia familio vivas en diversaj partoj de la mondo kaj decidis havi familian renkontiĝon en Istanbul. Neniu de mia familio ĝis nun vojaĝis tien. Ĉar mia antaŭa laboro finiĝis, mi havis sufiĉe da tempo por vojaĝi de mia hejmurbo Brest al Istanbul per trajno. Do mi decidis vojaĝi tiel kaj halti en pluraj urboj survoje. Stutgarto estis mia unua halto, poste venis Vieno, Budapesto, Belgrado kaj Sofio.

Mi planis mian vojaĝon kaj aĉetis biletojn, sed mi ankaŭ volis profiti de la okazo por praktiki Esperanton, kiun mi lernis ĉefe por amuziĝo kaj memortrejnado. Pere de Pasporta Servo, mi kontaktis Rainer Kurz, Esperantisto en Stutgarto, kiu akceptis renkonti kaj gastigi min.

Ni renkontis unu la alian antaŭ la artmuzeo "Cube" rekte en la urbocentro. Rainer ĉiĉeronis min tra Stutgarto. Ni vizitis la novan kaj malnovan kastelojn, la

memormonumenton de la milito de 1870, plurajn preĝejojn, muzeon, la statuon de Schiller, ktp...

Sekve, Rainer havis surprizon por mi. Li estis invitita de la "Old Tablers"-sekcio de Stutgarto por prezenti Esperanton. "Old Tablers" kaj "Round Table" estas internacia servoklubo (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Servoklubo>). Li proponis ke mi partoprenu kaj kontribuu al sia prelego, kiu okazis en la restoracio "Ratskeller".

Dum 40 minutoj Rainer detale prezentis Esperanton al la 30 klubanoj. Mia ĉeesto estis konkreta ŝanco prezenti min kiel parolanta esperantisto kaj kiel Pasporta Servo funkcias. Ĉar mi ne parolas la germanan, Rainer tradukis miajn klarigojn el Esperanto.

Tre interese estis kiel li eksplikis kiel oni konstruas vortojn el pluraj radikoj kaj afiksoj. La aŭskultantaro konstatis kiel facile oni derivas vortojn (ekz. ĉevalo = "Pferd") por esprimi inon (ĉevalino = "Stute"), idon (ĉevalido = "Fohlen"), aĉon (ĉevalaĉo = "Klepper"), aŭ konstrui eĉ novan signifon (ekz. ĉevalidinaĉo).

Rainer ankaŭ montris kiel facile funkcias la gramatiko: Ĉiuj literoj estas prononcitaj, kontraŭe al la germana kaj la franca. La konjugacio ne ŝanĝiĝas laŭ la pronomo. La principo de la akuzativo kiu ne estas tiel komplika kiel la germana kun la tri genroj kaj la aliaj kazoj. Ĉimaniere la spektantaro sendepende kapablis konstrui simplajn frazojn.

Post la ĉefa prelego de Rainer, mi diris kial mi lernis Esperanton, kaj ke mi bezonis ĉirkaŭe ok monatojn por kompletigi la Esperantan kurson de Duolingo, kiu nun permesas al mi interkomuniki kun aliaj esperantistoj. La ĉeestantoj estis surprizigita ke mi nur investis inter 15 kaj 30 minutojn tage por lerni la lingvon kaj ke hodiaŭ estis la unua fojo kiam mi vere persone parolas Esperanton kun alia homo. Mi ankaŭ eksplikis el kiu konsistas mia Esperanto-vojaĝo. Laste, sed ne malpli grave, ni bone manĝis kune en la restoracio.

Mi tre dankas Rainer por lia bonvenigo kaj mi esperas revidi lin baldaŭ. Kaj se vi, leganto, vojaĝos al Brest en okcidenta Bretonio kaj bezonas gastigadon, ne hezitu kontakti min per Pasporta Servo.

Edgar Lenhof el Brest/Francio



Rainer Kurz kaj Edgar Lenhof.

Medienecho

Leider gibt es immer mehr Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind. Sie sind hier kursiv gedruckt.

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die aber ggf. vorliegen, wird hingewiesen. Diese können Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zugesandt werden. Anfragen an *medienecho@esperanto.de* – Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

8. November 2025

FragDenStaat

**Förderung des Bundeswettbewerbs
Fremdsprachen trotz des
Ausschlusses von Esperanto**

Mit einem Schreiben von Louis von Wunsch-Rolshoven an das Sekretariat der Ständigen Konferenz der Kultusminister der Länder in der Bundesrepublik Deutschland (KMK)
<https://fragdenstaat.de/anfrage/foerderung-des-bundeswettbewerbs-fremdsprachen-trotz-des-ausschlusses-von-esperanto-durch-diesen-2/>



26. Oktober 2025

reddit

**Esperanto VS Interlingua
Was ist der Unterschied und die
Gemeinsamkeiten?**

https://www.reddit.com/r/Esperanto/comments/1ohl2kr/esperanto_vs_interlingua/?tl=de



25. Oktober 2025

FragDenStaat

Hat Esperanto eine Kultur?
Anfrage an die Vertretung der Europäischen Kommission in Deutschland

<https://fragdenstaat.de/anfrage/hat-esperanto-eine-kultur/>



15. Oktober 2025

Wikipedia

Artikel über Till Dahlenburg
https://de.wikipedia.org/wiki/Till_Dahlenburg



14. Oktober 2025

reddit

NUTRU LA PORKON |

Horrorgeschichte auf Esperanto

Fünfzigminütige Geschichte per Video

<https://www.reddit.com/r/Esperanto/comments/1o1mhst/>

[nutru_la_porkon_horrorrakonto_en-esperanto/?tl=de](https://www.reddit.com/r/Esperanto/comments/1o1mhst/)

13. Oktober 2025

reddit

**Panathenäisches Stadion und die
Wiederbelebung der Olympischen Spiele**

Mit einem gut verständlichen Video auf Esperanto

https://www.reddit.com/r/Esperanto/comments/1o51s3r/panatenea_stadiono_kaj_la_revigo_de_la_olimpia/?tl=de

21. September 2025

Esperanto Conversation in Restaurant

Lichtblick, Moabit

Veranstaltet von Lu

Jeden 3. Montag im Monat

Konversacio en Esperanto (aŭ en la germana aŭ angla..., se vi volas scii iom pli pri Esperanto kaj konatiĝi kun Esperanto-parolantoj).

<https://www.meetup.com/de-de/speak-learn-esperanto-in-berlin/events/kjbtjpyjcmbcc/>

11. September 2025

Rhönkanal

**Liedermalerei trifft Weltenfolk – Kaŝita
Kanto in Zillbach im Kirchenkeller**

„Außerdem gefiel uns die Idee des Esperanto, nämlich eine möglichst unabhängige und jedem zugängliche Weltsprache zu formulieren. Ähnlich wie... Musik“, heißt es in der Ankündigung.

<https://rhoenkanal.de/2025/09/liedermalerei-trifft-weltenfolk-kasita-kanto-in-zillbach-13-9-25/>

12. November 2024


Libera Folio

**En Finnlando aperas profesia filmo en
Esperanto**


”Patrinoj” estas nova, duonhora esperantlingva filmo, kiu nun pretiĝas en Finnlando kaj estos proponata por festivaloj de mallongaj filmoj dum 2025. La reĝisoro Anna Andersson elektis fari la filmon en Esperanto, ĉar la temo estas kontraŭmilita kaj ĉar ŝi volas, ke la okazaĵoj ne estu ligitaj al iu specifa lando. *<https://www.liberafolio.org/2024/11/12/en-finnlando-aperas-profesia-filmo-en-esperanto/>*

Ein erster Trailer für den Film "Patrinoj

- Mothers", der komplett auf Esperanto ist *https://www.reddit.com/r/Esperanto/comments/1o27112/a_first_trailer_for_the_movie_patrinoj_mothers/?tl=de*



Por derivita genre neŭtra triapersona pronomo en Esperanto



Pro la modernaj egaligaj streboj kontraŭ lingva seksismo, unu el la vortosppecoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis taŭgan adapton, estas la neŭtragenra triapersona persona pronomo.

Estas diversaj proponoj, sed kiu el ili plej bone konvenas al la ekzistanta lingvosistemo, sed sen enkonduki kontraŭfundamentan neologismon? Kiu el ili, aliflanke, deriviĝas de ekzistantaj etimoj?

Okupiĝinte pri multaj lingvoj, kaj klopodante konstati la originojn de iliaj pronomoj, mi observis ke, precipe, sed ne nur, ili evoluis el montraĵ pronomoj (demonstrativoj). Ne nur ili, sed ankaŭ la difina artikolo en tiuj lingvoj, kiuj ĝin havas, tiel estiĝis.

La sistemo de la triapersona persona pronomaro en Esperanto estas

- Li: vira singulara persona pronomo derivita de la Latina „ille“ (=“tiu, vira‘ persono“)
- Ŝi: ina singulara persona pronomo derivita de la Angla „she“ [ŝi] (<Germana “se” (=“tiu“))
- Ĝi: neŭtra singulara objekta pronomo ankaŭ uzata por reprezenti bestojn kaj hominfanojn, kies biologia genro aŭ estas nekonata aŭ nesignifa en kunteksto (apriora kreaĵo de Zamenhof)
- Ili: plurala persona pronomo derivita de la Latina „illi“ (=“tiuj“ inkl. la neŭtron)

La propono de „ri“ en IPR 2023/3 havus la ĉarmon de unusilabeco, sed ĝi, kiel „ĝi“, estas apriora, tamen ne-Zamenhofa. Atentindas, ke la grafemo „r“ reprezentas la plej alofonan fonemon de la internacia lingvo, kio povas kaŭzi dubigajn prononcojn.

Mia propono estas deriva, kaj kvankam ne-Zamenhofa, relative sistemkonforma. Kiel observite, la pronomoj en multaj lingvoj deriviĝas de pronomoj. En la korelativa tabelo de Esperanto troviĝas la montra pronomo „tiu“, kiu signifas ĝuste „tiu persono“, do „sen indiko de genro“. Senpera derivito estus „*ti“, unusilaba pronomo sistemkonforma. Kvankam uzado de la

posesivaj finaĵoj ne eblus, la genitiva pronomo „ties“ ofte jam plenumas la posesivan funkcion, eĉ pli ekonomie ol la pli fleksiaj adjektivaj finaĵoj. La uzado de la akuzativa formo „*tin“ estus senĝene sistemkonforma.

Gerald Tucker

Karaj gesinjoroj!


En niaj Esperanto-kluboj Prenzlau/ Uckermark kaj Neubrandenburg ni legis la artikolon de Franz Kruse pri la libro de Rudolf Fischer "Esperanto im Gespräch".

Ankaŭ ni interesiĝas pri problemoj por sekso krome vira kaj virina kaj via(j) personalpronomo(j). La "ĝi" povus, laŭ ni, diskriminaci homojn, kaŭze ke ja temas pri plenkreskuloj kaj ne pri infanoj.

La "ri" alsentigis nin kaj sonas por ni ne sufiĉe Esperante. Do – nun ni proponas la "di" – derivita de la vorto diversa.

La "di" estas kiel vorto ankoraŭ ne uzata. Krome en kelkaj kemiaĵoj ĝi ne ekzistas kiel prefikso aŭ sufikso.

Edeltraut Henning



Buchempfehlungen

In den letzten Wochen erreichten den DEB e.V. gleich zwei neue Romane, in welchen Esperanto erwähnt wird.

Zunächst „Projekt Double IQ“ von L. G. Taleson, das erst kürzlich erschienen ist. Der Name des Autors ist vermutlich ein Pseudonym, man findet nichts über den Autor im Internet, das über die üblichen Kaufempfehlungen hinausgeht. Vielleicht ein „sprechender“ Name aus englisch „tale“ und „son“, wer weiß.

Der Roman erzählt von einer dystopischen Welt im Jahr 2847, in der die gesamte Menschheit eine gemeinsame Sprache spricht, nämlich die „ELLZ-Sprache“. Diese Abkürzung steht nach Auskunft des Autors für „Extended Ludwik Lejzer Zamenhof-Sprache“. Man soll sich darunter wohl eine Fortentwicklung des Esperantos vorstellen; im Buch finden sich daher einige Begriffe auf Esperanto sowie das Gedicht „Gojo“. Das ist schön, aber warum der Autor sich des Esperantos bedient, wird nicht klar. Man muss allerdings anmerken, dass die Vorstellung, Esperanto habe sich in fast tausend Jahren, also von 1887 bis 2847, kaum weiterentwickelt, nicht besonders überzeugend ist.

Das Buch erinnert in weiten Teilen an „Schöne Neue Welt“ von Aldous Huxley, freilich ohne dessen literarisches Niveau zu erreichen. Es geht letztlich darum, dass eine KI (hinter der wie bei den meisten Dystopien eine autoritäre Regierung steht) über Leben und Tod entscheidet. Beworben wird der Roman mit den Worten „eine packende Zukunftsvision über KI, Ethik und die unermüdliche Kraft elterlicher Liebe“, allein, packend ist das Werk nicht, die Figuren bleiben blass, die Handlung vorhersehbar, es kommen inhaltliche und sprachliche Fehler hinzu. Darunter der, dass sich anscheinend im Jahr 2847 auch die Physik verändert hat, denn: „Die Fliehkraft beim Starten und Anhalten merkten sie an ihrem Körper überhaupt nicht.“ (Seite 7). Gemeint ist wohl eher die Trägheitskraft.

Es ist zweifellos löblich, dass der Autor der Internationalen Sprache den ihr gebührenden Platz zuweist, und auch vor den Gefahren eines totalitären Staates warnen will, aber der Roman zeigt letztlich nur die Projektionen der Gegenwart und bleibt daher ziemlich langweilig. Ein Lektorat hätte dem Buch sicher gutgetan. Schade auch, dass das Werk trotz des recht hohen Preises nur als Taschenbuch erhältlich ist.

Der zweite Roman, „Das Jahr 2330“ von Lutz Sebastian hat ein ganz anderes Niveau. Auch dieser Autor benutzt vermutlich ein Pseudonym, darauf gibt es im Abspann des Romans einen kaum versteckten Hinweis. Dieses Buch ist bereits im vergangenen Jahr erschienen und blieb anscheinend ungeachtet seiner Qualität bisher weitgehend

unbeachtet. Eines der Kapitel mutet wie ein Werblock für Esperanto an, der sehr gut gelungen ist, auch Neutral-Moresnet wird erwähnt, danach findet die Sprache aber keine weitere Erwähnung mehr. Weite Teile des Romans, der übrigens in Paris spielt, sind ein Dialog zwischen den beiden Protagonisten, nämlich dem (fiktiven) Autor, der aus dem Jahr 2031 stammt, und einer anderen Person, auf die dieser im Jahr 2330 trifft. Mit diesem altbekannten literarischen Trick kritisiert der Autor die Gegenwart, und zwar massiv. Der Leser muss sich auf heftige Polemik einstellen, Sebastian nimmt kein Blatt vor den Mund und nimmt Stellung zu allen möglichen Themen, von Architekturkritik über Erziehung, Religion, Sprachpolitik, Tierhaltung, verschiedenste

gesellschaftliche Erscheinungen, bis hin zu seinem großen Thema, die bevorstehende Revolution. Technik scheint ihn gar nicht zu interessieren, es geht in dem Roman vor allem um die charakterliche Entwicklung der Menschheit.


Dabei gibt es eine Menge origineller Ideen und auch humorvolle Szenen, etwa die Elefanten, die Alkohol konsumieren, und einiges mehr.

Den Autor muss man sich wohl als sehr belelenen Menschen vorstellen: Die Handlung umfasst genau einen Tag, das erinnert an James Joyce („Ulysses“), der Roman ist in 24 Kapitel eingeteilt, das mag eine Anspielung auf Homer („Odyssee“) sein, insgesamt führt die Hauptfigur ständig irgendwelche Zitate auf, die in Fußnoten erklärt werden, am Ende erhält der Zeitreisende eine Leseliste mit Buchempfehlungen, und so fort. Der Text enthält zahlreiche Anspielungen, von denen der Rezensent vermutlich nur einen Teil entdeckt hat, und ebenso heftige

Provokationen (auch die „Widmung“ ist eine solche, die allerdings den meisten Lesern gar nicht auffallen wird), das muss man als Leser aushalten.

Die Ausstattung ist im Gegensatz zu dem anderen besprochenen Werk, sehr hochwertig, das Buch ist gebunden mit Schutzumschlag und Lesebändchen, kostet dabei aber nur moderate 22 €, eignet sich also vorzüglich als Geschenk. Insgesamt eine klare Kaufempfehlung für „Das Jahr 2330“.

Andreas Emmerich



Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

Folge 86: Nachruf Karl-Heinz Schaeffer † (22.9.1942 – 20.10.2025)



Ein weiterer Leuchtturm in Esperantujo ist erloschen. Wir konnten es nicht fassen und müssen doch damit leben: das Jahr 2024 entriss unserer Bibliothek mit Hedwig Schaeffer eine wertvolle fleißige Mitarbeiterin und nun verließ uns auch unsere treibende Kraft Karl-Heinz Schaeffer.

Die beiden zusammen waren für uns immer ein unschlagbares Team und Vorbild, eben „**unser Fels in der Brandung**“, mit dem Potenzial, allen Stürmen zu trotzen.

Es geschah unerwartet und plötzlich: der Todesfall im Aalener Teilort Unterkochen lässt eine unermesslich große Lücke: unsere Esperanto-Gruppe Aalen verlor den Alters- und Gründungspräsidenten, die Aalener Bibliothek steht ohne Geschäftsführer da und muss doch die laufenden



Geschäfte fortführen – wir schulden das dem Erhalt unseres Kulturerbes, und die FAME-Stiftung muss künftig auch ohne einen ihrer wertvollen Mitstreiter auskommen.

Ich denke, wir müssen und werden weiter machen, nach einer angemessenen Auszeit vielleicht. Und ich hoffe man kann mir zugestehen, dass ich jetzt erstmal sage: **mir fehlen die Worte ...**

Zum Glück hat sich Alois Eder bereit erklärt, einen freundlichen Nachruf für Karl-Heinz Schaeffer zu verfassen:

Nachruf auf Karl-Heinz Schaeffer, Aalen

Am 20. Oktober 2025 starb überraschend, im Alter von 83 Jahren, der bekannte Esperanto-Aktivist Karl-Heinz Schaeffer in Aalen. Er wurde am 30.10.2025 unter reger Beteiligung, seiner Familie und zahlreicher Esperantofreunde, im Waldfriedhof Aalen kirchlich beerdigt.

Karl-Heinz Schaeffer war eine herausragende Esperanto-Persönlichkeit mit vielfachem Engagement. Sein Tod hinterlässt schmerzhaft Lücken in mehreren Tätigkeitsbereichen.

Die Gründung und die Stabilität der Esperantogruppe Aalen ist nicht zuletzt seiner Tatkraft zu verdanken. Beharrlichkeit, Verlässlichkeit, vor allem auch die Genauigkeit zeichneten ihn aus (ein Apotheker darf keinen Fehler machen, der könnte einem Menschen das Leben kosten).

Er hat, zusammen mit anderen Verantwortlichen, einen Weg gefunden, die Deutsche Esperanto-Bibliothek nach Aalen zu holen und deren Betreuung und Bestands-erweiterung zu organisieren. Dafür hat er selbst und mit freiwilligen Helfern unschätzbar viel Zeit investiert, um den stets wachsenden Bestand an Büchern und Zeitschriften mit seinem Team bibliothekarisch zu erfassen und dann selbst in den Computer einzugeben. (letzteres durfte kein anderer übernehmen, andere könnten ja Fehler machen, so dass man ein Buch nicht mehr finden würde!).





Dass der FAME-Preis für Förderung der internationalen Verständigung von der Stadt Aalen verliehen wird, das hat Karl-Heinz Schäffer mit Hilfe des Juristen Rainer Heckhausen mit dem damaligen Oberbürgermeister Pfeifle ausgehandelt. Die FAME-Stiftung geht auf den Stuttgarter Steuerberater Franz Alois Meiners zurück, dessen Namensabkürzung *fame*, zugleich *berühmt* bedeutet, wie jeder Esperantist wohl weiß.

Ausgezeichnet wird alle zwei Jahre eine Persönlichkeit, die durch beispielgebende Aktivität oder als Künstler sich um die Völkerverständigung durch Esperanto verdient gemacht hat und daher verdient, als „berühmt“ zu gelten und gefördert zu werden. Auch Karl-Heinz erhielt diese Ehrung 2014.

Hier soll bereits auf die nächste Preisverleihung aufmerksam gemacht werden: am 24. Oktober 2026 wird um 18 Uhr im Aalener Rathaus JoMo ausgezeichnet, leider nicht mehr im Beisein von Karl-Heinz.

Im Rahmen der Städtepartnerschaft der Stadt Aalen und Tatabánya in Ungarn hat die Aalener Esperanto-Gruppe auch unter Esperanto-Sprechern der beiden Städte Kontakte gepflegt. Persönliche internationale Freundschaften waren Karl-Heinz stets ein Anliegen und er hat sie gerne selbst gepflegt.

Im kirchlichen Bereich war Karl-Heinz immer aktiv. Er war ein aktives Mitglied des evangelischen Esperanto-Vereins KELI (Kristana Esperanto-Ligo) und nahm sehr häufig an dessen internationalen und vorzugsweise ökumenischen Treffen teil.

Das ökumenische Gottesdienst-Gesangbuch Adoru (Bete an), das seine Freunde, die drei Pfarrer Burkhardt, Eichkorn und Kronenberger erarbeitet haben, wurde in Aalen der kirchlichen Esperanto-Öffentlichkeit vorgestellt und 2002 mit dem FAME-Preis ausgezeichnet.

Die Aufzählung der Verdienste des Verstorbenen kann hier nicht vollständig sein.

Weitere Informationen bietet der Artikel **Karl-Heinz Schaeffer** des esperantosprachigen Vikipedio-Online-Lexikons: https://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Heinz_Schaeffer.

Karl-Heinz, du bleibst auf immer unserer Weltsprache-Gemeinschaft in Erinnerung als tatkräftiger Förderer der Friedenssprache Esperanto, die das Zeug hat, in einer gemeinsamen Welt für alle Menschen als Verständigungsbrücke zu dienen!



Alois Eder



Karaj legantoj de GEJ-Gazeto,

Mi salutas vin nome de redakcio de la GEJ-Gazeto. Kun la unuaj malvarmetoj kaj la pli fruaj vesperoj de la aŭtuno, ni denove eniras sezonon de pripenso. La somera brilo kaj la plejparto de esperantaj arangoj nun restas malantaŭ ni, sed la varmaj koloroj de la aŭtunaj arbaroj, laodoro de pluvo kaj la pli milda ritmo de la tagoj alportas sian apartan ĉarmon. Tempo por ririgardi, revizi planojn kaj antaŭenvidi al la jarŝanĝo.

En tiu ĉi eldono, vin atendas intervjuo kun ja nova TEJO-prezidanto Ana Ribeiro, raporto pri la pasinta KEKSO en Schleiden-Gemünd, Esperantaj sociolektoj kaj nia buĝeto por la venonta jaro.

Mi deziras al vi ĉiuj agrablan legadon!

Paul Widzowski »
por redakcio de GEJ-Gazeto



Intervjuo kun Ana Ribeiro, la nova prezidanto de TEJO

La intervjuo okazis la 29-an de Septembro 2025 en Berlino.



Ana ist seit September neue Präsidentin der Welt-esperantojugend TEJO. Wir gratulieren Ana ganz herzlich und freuen uns, dass wieder ein (ehemaliges) GEJ-Mitglied erfolgreich im TEJO-Vorstand mitwirkt.

Intervjuantoj estis Michael Vrazitulis kaj Frédéric “Frico” Düe.

Redakcio: *Unue gratulojn pro via nova rolo! Kiel vi sentas vin post via unua monato kiel prezidanto de TEJO?*

Ana Ribeiro: Estis interesa monato, mi povas diri. Do kompreneble estas multaj aferoj por fari. Antaŭe mi estis estrarano pri tekniko en TEJO. Kaj nun mi estas prezidantino, kaj ankoraŭ restis kelkaj farendaĵoj pri mia antaŭa rolo. Do mi devis fari transdonajn kunsidojn kun la nova respondeculo pri tekniko. Kaj same mi devis multe lerni pri la novaj fakoj, ekzemple [la fako pri] dungitoj, kun vi [t.e. Michael]. Do estis sufiĉe intensa monato. Mi sufiĉe multe lernis kaj ankoraŭ havas por lerni pri la strategio de TEJO kaj tiel plu.

Redakcio: *Bele, do espereble vi povos uzi tiujn kapablojn viajn dum la sekvaj 11 monatoj en tre bona maniero. Do estas ja tiel ke multaj GEJ-anoj jam konas vin el via antaŭa laboro en la estraro de GEJ. Kiel vi unue ekkonektiĝis kun GEJ fakte, kaj kio instigis vin aktivi en ĝi?*

Ana Ribeiro: Kiam mi venis al Germanio, t.e. en 2021, mi vidis anoncon pri KEKSO en Schwerte. Mi decidis iri, kaj tie mi interkonatiĝis kun vi [Michael], Orcino kaj aliaj GEJ-aktivuloj. Mi pensis ke la homoj estis mojosaj, kaj mi pensas ke vi invitis min al estraro post kelkaj monatoj. Mi memoras ke la unua afero kiun mi faris estis organizi kelkajn trejnadojn por GEJ. Do mi faris trejnadon dum KEKSO. Kaj mi ankaŭ helpis pri sociaj medioj. Kaj post unu jaro aŭ io tia, vi invitis min iĝi parto de la estraro.

Redakcio: *Kiaj memoroj aŭ spertoj el via tempo en GEJ restas por vi la plej gravaj aŭ influaj?*

Ana Ribeiro: Mi kredas ke eble kelkaj el la memoroj kiujn mi havis estis tre bonaj: Estis eble la organizado de JES antaŭ du jaroj. Tio estis tre, tre granda projekto kiun ni faris

kune. Kaj la teamo tre bone funkciis kaj kongruis. Kaj mi tre amuziĝis. Ankaŭ, mi tre ŝatis renovigi la aspekton de GEJ. Do mi kredas ke tio estis laboro kiu daŭris dum pli ol mia mandato, ĉar nuntempe Viktoria daŭrigas ĝin kaj uzas la modelojn kiujn mi kune kun mia fratino kreis por ekhavi pli da enhavo por GEJ kaj tiel plu. Do mi dirus ke tiuj estis la du plej gravaj kaj interesaj, do la aferoj kiuj restas plej gravaj. Sed kompreneble ankaŭ ĉiuj aliaj memoroj estas gravaj, sed se mi devus elekti, estus tiel.

Redakcio: *Vi aktivis ankaŭ en Brazilo antaŭ via tempo en GEJ. Kiel malsamis la Esperanto-movado tie, kompare kun la germana movado?*

Ana Ribeiro: Kompreneble, miaj aktivadoj en Brazilo estis ĉefe antaŭ la pandemio tie. Do mi ne havas bildon de kiel estas la nuntempa movado en Brazilo. Sed antaŭ la pandemio mi tre ĝuis partopreni en Novjara Arango de BEJO, kiu estas iomete simila al JES, sed en tropika klimato kaj vetero! Do ni iris al plaĝoj kaj tiel plu, dum ĉi tie oni frostas ĉe la novjaraj renkontiĝoj... Kaj mi memoras ke estis iomete pli da vojaĝo por povi renkontiĝi kun aliaj esperantistoj. Por partopreni en Novjara Arango mi devis flugi unufoje dum ses horoj, ĉar mi estis en nordo de Brazilo, kaj Novjara Arango estis en la sudo de Brazilo. En Germanio, la distancoj estas malpli longaj.

Redakcio: *Interese! Kaj kiel vi priskribus la ĉefajn diferencojn inter laboro en GEJ kaj laboro en TEJO, ekzemple pri organizstrukturo, labormaniero, aŭ internacieco.*

Ana Ribeiro: Mi kredas ke ĉe GEJ estis nur la estraro. Do la estraro pli-malpli faris la tutan laboron. Kaj ĉe TEJO estas stabo, do ni ankaŭ havas, krom la estraro, volontulojn, oficistojn. Kaj kompreneble tio aldonas ankaŭ kroman kompleksecon al la organizo. Do ĝi estas pli kompleksa por administri. Sed estas ankaŭ interese. Tiel en TEJO ni povas havi pli da projektoj, ankaŭ projektoj de kiuj profitis GEJ, Esperanto Senlime ekzemple. Pri internacieco, GEJ fakte estas sufiĉe internacia, ĉar mi memoras ke dum mia mandato estis mi el Brazilo kaj ankaŭ estis aliaj aktivuloj el aliaj landoj: Viktoria, kiu estas kvazaŭ germana, sed ne ekzakte; ankaŭ Utku, kiu estas el Turkujo. Do GEJ ankaŭ havas sian internaciecon, sed kompreneble TEJO estas ege pli internacia: En nia estraro estas du homoj el Eŭropo, du homoj el Afriko, unu el Azio kaj unu el Amerikoj.

Redakcio: *Ĉu estas io, kion vi lernis en GEJ, kio nun helpas vin en via rolo kiel TEJO-prezidanto?*

Ana Ribeiro: Kompreneble. En GEJ mi multe lernis pri funkciado de estraro de Esperanta organizaĵo, pri organizado de eventoj. Ankaŭ iomete pri dungaĵoj, ĉar malgraŭ ke ni ne havis mem dungitojn, ni helpis TEJO-n pri dungaĵoj. Ĉiuj tiuj spertoj en GEJ helpas min nun en la estraro de TEJO.

Redakcio: *TEJO reprezentas junajn esperantistojn tutmonde. Kiel vi vidas la rolon de landaj sekcioj kiel GEJ en tiu tutmonda kunteksto?*

Ana Ribeiro: Mi kredas ke la ĉefa rolo de organizaĵoj

kiel GEJ estas povi komuniki kun homoj kiujn eble TEJO ne povus atingi, ĉar TEJO bezonus komuniki en pluraj malsamaj lingvoj, en pluraj malsamaj landoj kaj kulturoj. Kaj por atingi tiujn homojn estas pli bone esti en landa sekcio.

Redakcio: *Kiaj estas viaj ĉefaj celoj por la venonta jaro kiel prezidanto de TEJO?*

Ana Ribeiro: Por tiu ĉi mandato, mi dirus, estas kelkaj aferoj: la okazigo de IJK 2026 en Katalunio, trovado de gastiganto por IJK 2027; stabiligo de niaj financoj, nia buĝeto; ankaŭ pli da kunlaboro kun landaj sekcioj kiel GEJ. Ni nuntempe havas novan redaktoron por revuo Kontakto. Do [estas celo] ke la transiro iru glate kaj ke la revuo daŭre aperu regule kaj bone. Kaj ke ni ekhavu retejon por nia revuo Kontakto, tio estus mojose, kun retaj artikoloj. Kaj la renovigo de la retejo de TEJO. Mi dirus ke tiuj estas la ĉefaj celoj.

Redakcio: *Ĉu vi intencas ŝanĝi la fokuson kompare al la antaŭa prezidantino?*

Ana Ribeiro: Mi kredas, ke la antaŭa prezidantino tre multe fokusiĝis pri eksteraj rilatoj, ĉar tio estis ŝia fako, kaj ŝi multe sciis pri tio. Mi ankaŭ scias ion pri eksteraj rilatoj, sed mi preferus fokusiĝi al la interna komunumo kaj kreskigo de TEJO interne.

Redakcio: *Okej, interna kresko kiel prioritato! Kaj persone: Kio vin plej inspiras en la Esperanto-movado hodiaŭ?*

Ana Ribeiro: Kion mi plej ŝatas en la Esperanto-movado estas la komunumo kaj la mojosaj homoj, kun kiuj mi povas interagi. Do mi ĉiam ĝojas kiam mi povas iri al renkontiĝoj kaj havi mojosajn babiladojn. Do certe, mi dirus, la homa konekto kaj la homoj ĝenerale.

Redakcio: *Ĉu vi havis iun apartan momenton en kiu vi havis tiun ekinspiriĝon pri Esperanto? En iu renkontiĝo?*

Ana Ribeiro: Do mi kredas ke mi ĉiam sentis min bone en Esperantaj renkontiĝoj. Dum mia unua Esperanta renkontiĝo mi estis tre juna. Tio estis en 2011. Mi estis 15-jaraĝa, ĉar mia patro ankaŭ estas esperantisto. Do li portis min. Kaj mi tre ŝatis la homojn kiujn mi ekkonis, kaj mi tuj iĝis parto de organiza teamo de IJK 2014 en Brazilo!

Redakcio: *Fine, ĉu vi havas mesaĝon aŭ konsilon por junaj GEJ-membroj, kiuj eble pensas pri engaĝiĝo en la internacia movado?*

Ana Ribeiro: Mi dirus ke la plej facila maniero estas sekvi TEJO-n en sociaj kanaloj kaj vidi la oportunojn pri kiuj ni publikigas. Do ĉiam estas oportunoj por engaĝiĝi, por fari aferojn, kaj vi povas kandidatiĝi por ekzemple esti en komisionoj, por esti en Komitato, por iri al eventoj, al seminarioj, trejnadoj kaj simile. GEJ-membroj ĉiam estas bonvenaj en niaj programoj!

Redakcio: *Dankon pro la intervjuo!*

Ana Ribeiro: Nedankinde.

Michael Vrazitulis

KEKSO

La pasinta KEKSO okazis samtempe kaj kune kun la Gebeneluxsa Kongreso en ĉarma kaj malgranda kuraceja urbo nomata Gemünd, kiu situas en la naturparko Eifel.

Kune kun la plejmulto de la kongresanoj, ni KEKSanoj pasigis la tempon en junulargastejo – kiu entute esperantiĝis dum semajnfine – kaj la ĉirkaŭaj lokoj. Ĉi tiu KEKSO estis iom hazarda, sed pro la eta kvanto da homoj, tio ne vere fariĝis problemo. Jen iom de tio, kion ni faris:

Ĵaŭdo

estis la unua alventago. La unua, ĉar ne ĉiu alvenis jaŭde.

Pro la fakto, ke ĉi tiu KEKSO okazis komence de Oktobro, la germanaj partoprenantoj havis liberan vendredon. Sed la ne-germanoj ne havis tiun bonŝancon. Do ne ĉiu jam alvenis jaŭde vespere. En malgranda rondo, kvinope, post la vespermanĝo, ni grupiĝis kaj esploris la ejon iomete. Kaj kion ni trovis? Ne nur nian KEKSan ĉambron, sed ankaŭ fotomaŝinon ni trovis. Tia eta skatoleca ilo por fari bildojn de si, kaj ricevi ĝin tuj poste aŭtomate. Kiaj pro iu hazarda kialo ni decidis, ke estus bona ideo foti nin ĉiujn sampteme ene. Sed... iel ajn ni sukcese ŝovis nin samtempe enen:

« Bildo farita de la fotomaŝino.

Vendredo

estis la unua de la du plenaj tagoj, kiujn ni havis en Gemünd. Post la tagmanĝo ni partoprenis longan marŝon, laŭ la rivero, al la Victor-Neels-Ponto; proksimume kvin kilometrojn en la direkto.


Komence ni preterpaŝis hejmfaritan pomsukbutikon, kaj dumvoje, al la alta pendoponto, ni vidis anasojn, ardezon, kaj lernis pri la katastrofo en 2021. La rivero, kiu nomiĝas Urft, altniveliĝis, fortiĝis, kaj ekdetruis la ĉirkaŭaĵon. Promenante tie, ioemete malfacile imageblis, ke tiu bela kaj trankvila rivero kapablas fari tion. Sed kelkfoje evidentiĝis, ke ĝi ja kapablas, kiam oni vidis restantajn ŝpurojn de la katastrofo.



En la vespero JoMo, dum kiu granda Bambo, multege da dancado kaj kunkantado okazis.

Sabato

plano ekestis iomete hazarde. Dum la promeno vendrede, ni pripensis, kion ni faru sabate, rigardante mapon de proksimaj lokoj, vidindaĵoj kaj vilaĝoj. Ni decidis viziti Monschau por esplori la historian urbon. Post tio, ni ne nur supreniris monton, kaj ĝuis belan vidpunkton al la urbo, sed ni ankaŭ decidis viziti Belgion. Monschau situas tuj apud la landlimo inter Germanio kaj Belgio. Do, ni regrimpis alian monton, kaj atingis la landlimon, kaj preterpaŝis Belgion. Alvenante ĉe la limo kaj rigardante mapon, surprizigis nin la fakto, ke tuj malantaŭ la landlimo, estas alia landlimo, kaj estas kvazaŭ cirklo de Germanio en Belgio. Ni encirklen iris, kaj esploris Mützenich iomete; bedaŭrinde sen multe da sukceso.



Stranga landlimo inter Belgio kaj Germanio, tuj inter la urboj Monschau kaj Mützenich**.



Sabatvespere denove estis koncerto. Tiu vespere Mezbakita muzikis kaj amuzigis nin.

Dimanĉe

Ĵam estis la lasta tago, kaj ne vere multe okazis dum tiu tago, krom ke ni ĉiuj, pakis niajn kunportitaĵojn kaj ĝisis unu la alian.

Memkompreneble multe pli okazis dum KEKSO, ol tiuj menciitaj aferoj, kiel komunaj tabloludsesioj, kankroserĉado aŭ prelejoj, sed malgraŭ tio mi esperas, ke tiu ĉi raportis iomete, kiun la KEKS-anoj faris dum la 35-a KEKSO.

*) Prenita de [Vikipedio] (<https://de.wikipedia.org/wiki/Victor-Neels-Br%C3%BCke>)

**) Bildo de [OpenStreetMap] (<https://www.openstreetmap.org/#map=14/50.55933/6.23805>)



Gebeneluksa Kongreso

Germana kaj Beneluksa Kongreso
2-a ĝis 5-a de oktobro 2025
en Schleiden-Gemünd / Germanio

translime



Sociolektoj de Esperanto

La artefaritaj sociolektoj
de Manuel Halvelik.

Arcaicam Esperantom

En 1969 Manuel Halvelik (pseŭdonimo de Kamiel Vanhulle, 1925-2006) kreis tri sociolektojn de Esperanto, por plenigi breĉon, kiun la planlingva naturo de Esperanto lasis malferma, sed kiun Zamenhof jam komencis plenigi per siaj proverboj: la lingvonivelojn, kiuj superas la formalan normlingvon, kiu troviĝas en libroj kaj estas instruata en kursoj; la lingvonivelojn, kiujn en aliaj, dum jarcentoj evoluintaj lingvoj plenigas pli fruaj evoluaj stadioj de la lingvo: la ĉiutaga lingvo, en kiu miksiĝas parola lingvo kaj dialektoj, kaj slango, kiun parolas nur certaj loĝantargrupoj, kiuj difinas sin ekzemple laŭ aĝo aŭ socia tavolo.

La nivelo de la “malnova lingvo”, kiu konservas iujn arkaikajn elementojn el pli fruaj lingvoniveloj, formas en multaj “naturaj” lingvoj la lingvon de kanonizitaj literaturaĵoj, kiuj estas konsiderataj aparte altvaloraj kaj instruataj en sia origina formo en lernejoj: Goethe, Shakespeare, Dante; Chaucer aŭ la *Nibelungenlied*. Escepte de kelkaj tute eksteruziĝintaj formoj kaj vortoj, ĝi tamen estas ankoraŭ komprenata kaj povas esti imitata de denaskuloj, kiam teksto devas ŝajni aparte malnovranga.

Por atingi ĉi tiun efikon Halvelik kreis specon de “latino” de Esperanto: La gramatiko videble estas pli formoriĉa: anstataŭ havi nur unu formon por ĉiu persona pronomo (mi faras, vi faras, ŝi faras) en la fantazimondo de Halvelik ekzistis almenaŭ ses konjugaciaj formoj por ĉiu nombro: *mihi pharams, tu pharas, eshi pharat, nos pharaims, vos pharais, ilĉi pharait*. Sed anstataŭ simple inventi hazardajn formojn, Halvelik konservas la esperantajn bazprincipojn, ĉar ankaŭ ĉi tiu konjugacio havas enan logikon: -ms, -s, -t por la unua, dua kaj tria personoj, kaj diftongo, kiu, kiel ĉe -oj, -aj, montrante la pluralon.

Plie, li aldonis du kazojn (dativo kaj genitivo) ĉar la evoluo de kazo al kombinaĵo “prepozicio + nominativo” ekzistas en pluraj hind-eŭropaj lingvoj, precipe latinidaj, kiuj diferenciĝas laŭ finaĵoj: *Miĥi widams lĉin, kay lĉi widat mĥin*. Mihas amiko donat mĥid pomoyĉn. (Mi vidas lin kaj li vidas min. Mia amiko donas pomojn al mi.) La prononco ne multe ŝanĝiĝas, sed la skribmaĉero jes: por arkaike aspektanta skribmaniero Halvelik orientiĝas laŭ la malnovfranca kaj rezignas pri la ĉapelitaj literoj favore al *gh, zh, gh*.

Kiel ekzemplojn oni povas mencii la tradukojn de Halvelik de aforismoj kaj fakvortoj:
omnia vincit amor Amom cheyon wencat Ĉion venkas Amo
ne bis in idem ned duxam prĉ samam ne dufoje pri la sama afero
hypophysis cerebri Tzerbes Hypophizom hipofizo (“Hirnan-
hangdrĉse”) “pituitary
gland”)

En la literaturo tamen la uzo de Arkaikam Esperantom ne firmiĝis, ĉar la Idom, kontraŭe al la planoj de Halvelik, por ordinara Esperantistoj (kiel ĉi tie en traduko de la fabelo Roman de Renard (malnovfranca, 12-a jarcento)) ne estas plene legebla:

*Grandegam estit phiplezurom
del Renchyom pru ityu Torturom.
Bruirit Tibert' ityel blequæ
que phinæ Martinet postwequæ
eccriit: "Haha, ghustmomentæ
exmetims Shnuron saghrudentæ;
captitam yad Shtelistom shaynat,
cocraban Lud' eghi malgaynat,
pri Pharom 'ghiam estot Pagom !"
Exprenit in samgestam Agom,
por Lumon pharir, paylan Phascon,
char Torchom phatziligut Tascon.*

Popido kaj Gavaro

Iasence kiel malo de Arkaikam Esperantom Halvelik kreis Popido (POPola IDOmo) kiel "parollingvon", kiel malpli prestiĝan fikcian dialekton. Simile al realaj dialektoj en Popido montriĝas sonŝanĝo de -as, -is, -os al -at, -it, -ot, ĝi perdas la substantivan finajon -o kaj mallongigas la verbojn havi kaj esti al vaj kaj saj. Participoj formiĝas per -and: Mi zit trinkanda (Mi estas trinkanta). La akuzativo preskaŭ tute malaperas, tendenco observebla ankaŭ ĉe komencantoj en la regula Esperanto, kaj anstataŭiĝas per pli firma vortordo, kiu tamen jam implicite egalas al tiu kutima en la klasika Esperanto: Mi vidat los hundos. Los hundos vidat mi. (Mi vidas la hundojn. Min vidas la hundoj.)

Simile al limregionaj dialektoj kiel ekzemple la Badena kun ĝiaj multaj francaj pruntaĵoj, Popido anstataŭigas kelkajn origine esperantajn vortojn per neologismoj el eŭropaj lingvoj:

bonvolu	<i>ples</i>	please
jam	<i>ŝon</i>	schon
multe	<i>muĉe</i>	mucho
fraŭlino	<i>mamzel</i>	mademoiselle

Ekzemplo: **Lo Ĉasist** (M. Halvelik)

*Poet, li sat kwaze ĉasist,
ku arde aventurs postkurat.
Nej sjam bonŝanc al li susurat.
Lo vakreven sat ofte trist.
Ko li alstrebat sat leĝer;
pro eta vent ĝi forblovijat,
bird, ku til los arbs levijat
o til ĉielê de liber...*

POPIDO
(Elipo de Popola Idjomo)



Gavaro iras en ĉi tiu direkto ankoraŭ plu en la vortprovizo, sed konservas la gramatikon plejparte senŝanĝa: "Gavaro diferencas de la tradicia zamenhofa lingvo per apartaj vortaro, afiksaro, kaj esprimaro. La gramatiko male restas nepre la sama kiel antaŭe." Tre klare ĝi transdonas la impreson de "malkleruloj", kiam

la nombroj estas prenita el *Volapük*: *bal, twel, kwil* ktp. Substantivoj, adjektivoj kaj infinitivaj verboj povas esti vastigitaj per la nespecifaj sufiksoj -umo, -ala, -izi. Kerna parto de Gavaro tamen estas la novaj radikoj, kiuj povas esti formitaj per metaforoj, vortmiksoj, akronimoj kaj ksenismoj. Halvelik tie sekvas modelojn kiel ekzemple la franca Argot, kiu kreas neologismojn per mikado de silaboj ene de vorto. Por establitaj Esperantovortoj li enkondukas plurajn radikojn: dum domo povus esti perceptata kiel latinida aŭ slava, Halvelik aldonas kiel sinonimojn kasao, zgrado, bajito (hispana, rusa, hebrea), krom semantike similaj vortoj, kiuj ankaŭ povas esti uzataj metafore: budo, kajuto, kesto, tendo ktp. Ĉar la esperanta prononco restas senŝanĝa, oni tamen rezignu pri angleca *hoŭso. Ĉi tiu vortokreemo kun ete malsimilaj vortoj (ĉar ni ekzistas tutaj sinonimoj) kongruas kun la Sapir-a vidpunkto, kiun Halvelik mem citas en sia libro pri Gavaro, ke internacia lingvo devas havi „maksimuman laborpotencon“, tio estas: kapablon esprimi ampleksajn kampojn de homa sperto, ne nur la praktikajn uzojn de Esperanto.

Ekzemplo el la traduko de Halvelik de *Eduardo kaj Agripina* (René de Obaldia):

*Bluzulo – Merdo! la oldulino forglitas! Diable, ne eblas!
(Li estas tute konsternita.) Mi, mi forrunas. Vi ne konas min, aŭdu! Vi neniam vidis min! Kia afero!*

La vorto mojosa, efektive ne enkondukita en Gavaro, tamen bone konvenas en la slango kiel akronimo de modern-jun-stila kaj montras, ke, malsame ol la literaturaj fikcioj Arkaikam Esperantom kaj Popido, kelkaj elementoj de Gavaro efektive devenas el la reala esperanta parollingvo.

Fontaro



Halvelik, Manuel: Arkaika Esperanto: La verda pralingvo; aldono al Fundamenta Esperanto, 2010.

Halvelik, Manuel: Gavaro, la verda slango, Serio "La socielekta triopo", versio 2.1, 2006.

Halvelik, Manuel: Popido, la verda dialekto, Serio "La socielekta triopo", versio 2, 2009.

SAPIR, Edward: The Function of an International Auxiliary Language. Romanic Review, Julio 1925.

Paul Widzowski



Buĝeto por 2016

Haushaltsplan 2016 – Deutsche Esperanto-Jugend e. V.

Hier findet ihr den Haushaltsplan für 2016 in Form einer Gewinn- und Verlustrechnung. Wenn ihr Nachfragen zum Haushaltsplan habt, dann stellt diese gerne per E-Mail an gej.kasko@esperanto.de (Kassenkommission der DEJ).

	Plan 2016
GuV (Nettowerte)	
Umsatzerlöse	38.750
... davon KEKSO / GEJMS	1.600
... davon JES 2025/26	37.000
... davon GEJ-Semajnfino	150
Gesamtleistung	38.750
Aufwendungen KEKSO / GEJMS	1.900
Aufwendungen JES	37.000
Aufwendungen GEJ-Semajnfino	150
Rohertrag	-300
sonstige Erträge	1.240
... davon Spenden	240
... davon Mitgliedsbeiträge	1.000
... davon Fördergelder	0
betriebliches Rohergebnis	940
Personalaufwand	0
Abschreibungen	0
sonstige Aufwendungen	3.096
... davon Verwaltung	2.000
... davon Versicherungen/Beiträge	271
... davon Vorstandskosten	150
... davon Vorstandswechsel	150
... davon Organisationstreffen	250
... davon Werbungskosten	100
... davon Kosten des Zahlungsverkehrs	125
... davon sonstige Kosten	50
Betriebsergebnis	-2.156
sonstige Zinsen und ähnliche Erträge	0
Zinsen und ähnliche Aufwendungen	0
Zinsergebnis	0
Geschäftsergebnis	-2.156
außerordentliche Erträge	
außerordentliche Aufwendungen	
außerordentliches Ergebnis	0
Steuern vom Einkommen und Ertrag	
sonstige Steuern	
Jahresüberschuss/-fehlbetrag	-2.156

Kristana Esperanto-Kongreso 2026 „La Biblio – ponto inter kulturoj”

100 jaroj de la Esperanta Biblio
8–15 Aŭgusto 2026 Gerlico/Görlitz, Germanio

Karaj Gefratoj, germaniaj kaj pollandaj kristanoj kore invitas vin partopreni Kristanan kongreson en urbo, situanta en du landoj Görlitz/Zgorzelec/Gerlico! La urbeto Gerlico situas rekte apud la rivero Niso ĉirkau 100 km oriente de Dresdeno, 160 km okcidente de Vroclavo kaj 200 km sudoriente de Berlino.

Loko: Gerlico estas fama pro sia unika, per milito neniam detruita centro. Tial ĝi fariĝis ŝatata kuliso por filmoj. Historie ĝi apartenas al Silesio, nur post la dua mondmilito politike al Saksio, sed eklezie de kelkaj jaroj al Berlino kaj Brandenburgio. Ĝi atingebblas trame de la stacidomo per tramo linioj 2 kaj 3.

De Gerlico ni pilgrimos al Sankta Tombo pli originala ol tiu en Jeruzalemo, al la mondfama centro de la Moravia Frataro „Herrnhut” kaj al la aktiva monaĥinejo St. Marienthal. Eblos viziti la domon kaj tombon de la mistikulo Jakob Böhme, la Silesian Muzeon. Ni ankaŭ invitis rabenon.

Kongresjo: Nia kongresejo estas CVJM Herberge Peregrinus, en la germania parto en la historia centro. La Pilgrimejo Peregrinus estas baroka palaco, iama altlernejo kaj studentloĝejo de eklezia muziko en la tiama evangelia landa eklezio de Malsupra Silezio.

Malmultajn metrojn for en la sama strato troviĝas la pensiono „Zum Antonschen Gut” kaj la hotelo „Zum Klötzelmönch”. Tie eblos loĝi dum la kongreso, se vi deziras pli da lukso.

Eblaj ekskursoj

1. Pilgrimado tra Gerlico al la Sankta Tombo
2. Vizito de la Silesia Muzeo en Gerlico
3. Vizito de la Preĝejo de Sankta Petro (Peterskirche) en la urbocentro
4. Promenado al la pola urbo(parto) Zgorzelec kun ebleco viziti la domon (muzeon) de Jakob Böhme
5. Ekskurso al la monaĥinejo Marienthal apud Ostritz

Programkotizo sen loĝado kaj manĝoj: ekde 100 Eŭroj. Loĝado kaj manĝoj en la pilgrimejo ebla.

Pliaj informoj: <https://www.esperanto.de/eo/keli-kongreso-eo>

Krucenigma konkurso

Solvon de la krucenigmo bv. sendi al: stano.marcek@gmail.com.


Unu el la solvintoj (decidos loto) ricevos donace la verkon “107 krucenigmoj en Esperanto” de la aŭtoro Stano Marček.

La solvo el la antaŭa numero:
**TRANKVILIĜU, MI DO LUDOS
POR VI LULKANTON.**



		POST-KURU, PERSEKUTU	LA PLEJ ALTGRADA	GRAMO	★	BONVOLU TURNI	LIMIGITA SPAC'	KOMPE- TENTA PRITAKS'	DE TIU	★	ŜILINGO	PLENDA EKKRIO	ROMANE 999	DUA PARTO DE LA KAŜFAZO
	BRAZILIO, BRITIO (Av. simb.) KAŜFAZO 1-A PARTO				KUIREJA INSEKT'					LIKVAJ' EL HAŬTO				
HAŬT' DE ARBOJ				NEREALE, IMAGATE							INKLINI			
				VIRNOM'							ANTIKA VEST'			
VIGLA MUZIKAJ'						ELKRESKAJO SUR KAPO DE KOKO PARTO DE LA NAZO							NUMERALO TRANĈAS PER DENT- HAVA ILO	
RILATA AL TROPIKA FRUKTO							EKZISTU					SIMBOLO DE STANO REGION' APUD VENECIO		
							INFAN'							
AKUZA- TIVA FINAJO		DISERIGA ESPLORAD'							SUFEREJ' (Bibl.)					
									SIMB. DE SEKUNDO					
ESPE- RANTISTA FEDE- RACIO			POZITIVA ELEKTROD'	KELTO EL SKOTLANDO				GLATIGI PER RASPA PAPERIO						
RABOBEST' KUN STRIOJ										EN KIU TEMPO				
										★	AŬTOSIMB. DE USONO			
FEMALA				TITOLO DE BRITA NOBELO							ELVOKI AL DUELO			
										DECI- LITRO			SIMB. DE REZIS- TANCO	
DRAM' DE SEKSPIRO													SUBABAT'	
DIO DE LA VENTOJ										LA TRIA TONO		POŝT- KARTO ESTAS BLANKE VARMEGA		
SIMBOLO DE SULFURO		VALORA METAL'												
		3-ELEK- TRODA DIAK'												
AŬTO- SIMBOLO DE TOBAGO			ROMANE 500											
			KARTONA FOLIO											
PARTO DE KURBO														
REFLEK- SIVA ADJEK- TIVO				INSEKTO DETRU- ANTA VESTAJOJN	ARABA VIRNOM'	★	PAĜO	GENT' HOM- SPEC'	SIMBOLO DE EJN- STEJNIO	MEZUR- UNUO POR BRUL- LIGNO	AMASA, KOLEKTIVA GRAVA KORPO- PART'			
GARDADO DE INFANO						REPRODUK- TOS LIBRON							ADJEKTIVA FINAJO	
						AMERIKA ŜTATARO							RILATA AL OLEORICA FRUKTO	
EKSENTU TREMOM PRO DANĜERO							ĈIELA KORP' INTERNACIA SCIENCA ASOCIO E-ISTA					MEDICINA SUFIKSO		
												BATAL- KOMENC', STURM'		
RADIUSO		GREK- DEVENA MULTIMI- LIONULO PENIS'							TUTSIMILE, IDENTE					
									FOTO- GRAFAJ'					
NUME- RALO			DI' DE LA AMO					PROKSIMA PARENĈIN' SUBSKRIBO DE ANO- NIMO						
			DISTRIBUA PREPOZICIO											
LAV- PURIGILO					KRIPLULO, MALGRAN- DEGULO					PARTO DE PREGEO SUBSTAN- TIVA FINAJO				
					SIMB. DE FOSFORO									
KVALITO				VALOR- UNUO ĈE LUDOJ							KONJUNK- CIO			

Bibliaj Tagoj en St. Goar ĉe l' Rejno de 2026-02-25 ĝis 2026-03-01 (merkredo - dimanĉo)



Urbocentro kun rigardo al la kastela ruino Rheinfels
Foto: © TI St. Goar

Nia kunvenejo:
Loreley-Jugendherberge
Bismarckweg 17
56329 St. Goar
Tel. 06741 388

www.jugendherberge-St-Goar.de
Situo: ĉ. 700 m norde de la stacidomo

Organizanto: Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanujo r.a.

Landa sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), prezidanto: pastro Wolfram Rohloff, Am Marktplatz 82, D-09496 Marienberg-Zöblitz

Partopren-kotizoj

La prezo por tranoktado kaj 3 manĝoj tage en du-lita ĉambro (surteraj litoj) kun duŝo/necesejo, ekskursprogramo 295 € (post 2025-11-30 310 €) por ĉiu persono. Rabatoj: Loĝantoj en eksterlando -75 €; en Germanujo loĝantaj KELI-membroj: -25 €. Krompago por unuilta ĉambro (entute): +60 €.

Programo

Teologia temo (Wolfram Rohloff)
Komuna preĝado kaj kantado per "Adoru" (muzika kadro: Stefan Lepping). Ĵaŭdon ĝis sabato: Turismaj ekskursoj (Ulrich Matthias) Aktualajn detalojn vidu en la Interreto: www.esperanto.de/keli.

Kondiĉoj de aliĝo

Via aliĝo validas post la alveno de via antaŭpago de 40 € kaj estos konfirmata post ricevo. La reston de la kotizoj ĝiru ĝis la **19a de decembro 2025**. Aliĝoj post tiu dato nur eblos, se ni ricevos pli da lokoj.

La antaŭpago estos repagata, se vi aliĝas anstataŭanton (samseksan). Kiu nur pro financaj kaŭzoj ne povus partopreni, petu subvencion de la Fondajo de Familio Fischer.

Ajnajn demandojn kaj petojn direktu al la **komiŝito por organizado kaj financoj**
Rudolf Fischer,
Amtmann-Daniel-Str. 11c, D-48356 Nordwalde
☎ 0049 2573 / 626 und 0049 152 075 175 26
✉ fischru@uni-muenster.de

Jen mi aliĝas definitive al la Bibliaj Tagoj
de 2026-02-25 ĝis 2026-03-01 en St. Goar.

(titolo+)nomo: _____
strato/donnum.: _____
kodo, urbo: _____
telefono: _____
poŝtelefono: _____
retpoŝta adr.: _____

Membro de KELI kun "Dia Regno" ☐ jes ☐ ne
vegetarano ☐ laktozo ☐ ceteraj limigoj ☐

☐ Mi jen mendas 2-litan ĉambron kune kun:
vegetarano ☐ laktozo ☐ ceteraj limigoj ☐

☐ La sumon de _____ € mi ĝiris je _____ (dato)

al la sekvanta konto:

☐ Esperanto-Liga für Christen, Ev. Bank Kassel
IBAN DE20 5206 0410 0006 4349 16
BIC GENODEF1EK1

☐ UEA-konto de Rudolf Fischer: rfis-w

Rimarkigoj / proponoj:

**Bv. sendi la suprajn datumojn poŝte aŭ
elektronike al:**

D-ro Rudolf Fischer, Amtmann-Daniel-Str. 11c,
D-48356 Nordwalde, Germanujo
✉ fischru@uni-muenster.de